

Sufikso –id/o

La sufikso –id/o esprimas ĝeneralan ideon de naskiteco.

Sufiksa rolo 1:

Pri homoj, teritorio aŭ gento, sen ia nuanco pri aĝo, ĝi signifas **filo de** aŭ **devenanto de**.

	filo de	devenanto de
reĝo	reĝido	
princo	princido	
grafo	grafidino	
homo	homido	
Napoleono		napoleonidoj
lando		landidoj
latino		latinidaj lingvoj

Sufiksa rolo 2:

Pri bestoj aŭ vegetaĵoj, ĝi signifas **juna naskito ne matura**.

	bestoj	vegetaĵoj
ĉevalo	ĉevalido	
koko	kokido	
ŝafo	ŝafido	
bovo	bovido	
birdo	birdido	
planto		plantido
branĉo		branĉidoj
arbo		arbido

Ido: La sufikso –id/o memstariĝis kun la signifo infano, filo, posteulo aŭ disĉiplo.

Geedzoj kun multaj **idoj**.
Ni ĉiuj estas la **idoj** de Adamo.

La **idoj** de sankta Bruno.
La **idaro** de Adamo kaj Evo.